
# BOLETIN

## DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

AÑO XIX - Nº 245 MAYO-JUNIO 1981

# INTERNACIA RENKONTIĜO EN BILBAO



Pendanta ponto de Portugalete (Bilbao)

**BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

DIRECTORA
Dª Mª Aurora Viloria Nieto

DIRECCION Y ADMINISTRACION:
Dos de Mayo, 4
VALLADOLID

REDACTOR JEFE
D. Salvador Aragay Galbany
Bassegoda, 40 - Telf. (93) 3338081
BARCELONA-28

COMITE DE REDACCION

D. Giordano Moyá
D. V. Hernández Llusera
D. Gabriel Mora y Arana
D. Pedro Nuez
D. Luis Serrano Pérez
D. Miguel Gutiérrez Aduriz

*La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de H. E. F., escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.*

# UTILAJ ADRESOJ

HISPANA ESPERANTO FEDERACIO
Dos de Mayo, 4
VALLADOLID-4

**Prezidantino**

Mª Rafaela Urueña Alvarez
Avda. Ramón y Cajal, 12 2º C
Télf. (983) 260086
VALLADOLID-11

**Sekretario**

Luis Hernández García
adreso kiel supre

**Kasistino**

Carmen Conde Labajo
Calixto Valverde 8-8º-A
VALLADOLID

Pagoj sendu al nia Konto
Nº 001.664-0
Caja de Ahorros Popular
Ag. Urbana E.
A. Lorenzo Hurtado, 1
VALLADOLID

LIBRO-SERVO DE H. E. F.

Jacinto Urueña Antón
Dos de Mayo, 4
VALLADOLID-4

Pagoj por Libro-servo, sendu al
Caja de Ahorros Popular
Oficina Central
Cuenta Nº 042.268-4 a nombre de
LIBRO-SERVO DE H. E. F.
VALLADOLID

ELDONA FAKO

Inés Gastón
Pº de la Constitución, 35-4º
ZARAGOZA-1

INFORMA FAKO

Ramón Molera
Sta. Joaquina, 13
MOYA (Barcelona)

ĈEFDELEGITO DE UEA

Juan Azcuénaga Vierna
Capitán Palacios, 3-4º N
SANTANDER

H. E. J. S.

(Junulara Sekcio de H. E. F.)
Carreras Candi, 34 36
BARCELONA-28

Depósito Legal: VA. 616 1978
Gráf. Andrés Martín, S. A. Juan Mambrilla, 9 - Valladolid

# GRAVA SUKCESO DE ESPERANTO EN LA MONDA TURISMA KONFERENCO



De la 27-a de septembro ĝis la 10-a de oktobro 1980-a, kunvenis en Manilo 107 plenrajtaj registaraj delegacioj, kaj 91 observantaj delegacioj de neregistaraj kaj registaraj organizaĵoj, inter ili U. N. kaj UNESCO, por tie partopreni la Mondan Turisman Konferencon.

La Ministro pri Komerco de Hungarujo, S-ro Vilmos Saghy en sia raporto al tiu Konferenco pledis por Esperanto, deklarante ke oni devus kuraĝigi la instruadon de Esperanto al turistoj kaj al ĉiuj laborantoj en la turisma fako. En la unua tago de la Konferenco, la raporto de la hungara Ministro estis transdonita al ĉiuj delegacioj, kompreneble en la lingvo en kiu ĝi estis ricevita, t. e. en la angla, franca kaj rusa. Poste, Plena Konferenco okazis dum la unuaj tri tagoj por ĝenerala diskuto antaŭ ol dividiĝi en ĉefkomisionojn.

Oni devas rimarki ke ĝenerale, la fakaj Konferencoj daŭras monatojn, eĉ jarojn, ekzemple, la III-a Konferenco pri Juro de la Maro komencita en 1973-a kaj ankoraŭ nefinita; tamen, la Turisma Konferenco daŭris nur du semajnojn, kaj tio estas nesufiĉa tempo por trakti profunde pri Espe-

ranto en tiu kampo. Tamen, por pli rapide agi, la akcepto de la Finaj Konkludoj ne okazis per voĉdonado, kiel okazas en la longdaŭraj konferencoj, sed per «konsento» nova metodo rekomendita de la Unuiĝintaj Nacioj al la fakaj konferencoj. Tiu ĉi metodo estas pli rapida kaj konsistas el eksterkunvenaj kompromisoj ebligantaj konsenton pri la fina teksto sen publikaj konfliktoj inter landoj.

Tiel, post diplomata laboro, aperis la fina teksto de la Konferenco agnoskanta la utilecon de Esperanto kaj ĝian rolon por faciligi la internacian komunikadon.

Jen tiu grava Deklaracio, en la parto rilatanta al Esperanto:

**«La Konferenco... deziras ke estu daŭrigataj la penadoj por akceli la formiĝon de turisma konscio por plifaciligi kaj kuraĝigi la komunikadon inter la vizitantoj, la enloĝantoj de la vizitataj lokoj kaj la turisma oficistaro.**

**Substrekas tiurilate, la gravecon de la kono de la lingvoj, ĉefe de tiuj kun universala alvokiĝo, kiel Esperanto**».

Tiu ĉi fina oficiala teksto estis dissendita el Madrido unu monaton post la fermo de la Konferenco kun la du paragrafoj pri Esperanto, ĉar ili ne troviĝis en la projekto aprobita en Manilo. En tiu fina sukceso, ni devas mencii la gravan intervenon de S-ano Gian Carlo Fighiera, kiu en 1978-a estis dungita de la OMT (Organizaĵo Monda por Turismo) kiel membro de la komisiitoj por la preparado de tiu konferenco, kaj sukcesis diskrete sed efike informi pri Esperanto kaj ĝia utileco por la turismaj celoj ĉiun funkciulon de la OMT, eĉ ties Ĝeneralan Sekretarion S-ro Lonati. Dum la Konferenco S-ro Fighiera estis nomita Vic-estro de la Sekretariaj Servoj kaj respondeculo pri la funkciado de la tradukistaj servoj. En 1979-a dum kunveno de ŝtataj reprezentantoj en Madrido, S-ro Fighiera parolis pri Esperanto kun kelkaj delegitoj, kaj tiu konstanta laboro sukcesigis Finan Deklaracion.

Do, grava atingo pro la fakto ke Esperanto nun situas samnivele kun aliaj naciaj lingvoj, kaj eĉ super ili, ĉar la Deklaracio substrekas la gravecon de la scio de lingvoj, precipe de tiuj universaliĝemaj, kiel Esperanto.

Mi nur rekomendus al ĉiu esperantisto interesa pri tiu Deklaracio kaj ĝiaj specialaj cirkonstancoj, legi «Heroldo-n de Esperanto» numerojn 17-an (22-23-80-a) kaj 1-an (Januaro 1981-a), por ke ili pli detale povu koni tiun gravan agnoskon.

**M. R. Urueña**

---

**NOTO**: Jen la teksto de la Deklaracio en hispana lingvo, tia kia ĝi aperis en tiu ĉi oficiala lingvo:

«La Conferencia... hace votos por que se prosigan los esfuerzos desplegados con vistas a promover la conciencia turística, con el fin de facilitar y favorecer la comunicación entre los visitantes, los residentes en el lugar de acogida y el personal turístico.

Subraya, a este respecto, la importancia del conocimiento de lenguas, especialmente de las lenguas de vocación universal, como el Esperanto».

---

# CUENTAS DE TESORERIA DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO 1980

## INGRESOS

| | | |
|---|---|---|
| Sobrante del año 1979 .................. | 32.519 | |
| Cuotas de socios ......................... | 289.947 | |
| Venta de material ........................ | 5.021 | |
| Donativos ................................. | 20.697 | |
| Beneficio Congreso de Madrid ............ | 90.500 | |
| Derechos exámenes ...................... | 8.000 | 446.684 |

## GASTOS

| | | |
|---|---|---|
| Gastos correo y teléfono ................. | 21.095 | |
| Renta local y servicios .................. | 12.000 | |
| Material divulgación y fotocopias ......... | 30.082 | |
| Cuotas U. E. A. 1980 .................... | 11.400 | |
| Hipoteca oficina de Madrid .............. | 7.550 | |
| Gastos Congreso de Madrid ............... | 55.516 | |
| Material oficina ........................... | 1.900 | |
| Impresos reembolsos ...................... | 2.720 | |
| Ayuda a Juveniles ......................... | 1.000 | |
| Sección Editorial .......................... | 15.114 | |
| Donación libros Callosa de Segura ....... | 3.000 | |
| Imprenta y BOLETIN ....................... | 259.156 | |
| Saldo a Cuenta Nueva .................... | 26.151 | 446.684 |

**NOTA:** Aunque figura en el apatado de «Beneficio Congreso de Madrid 90.500 pesetas, en la partida de Gastos Congreso de Madrid figura con 55.516 pts. Por tanto el beneficio neto del Congreso de Madrid, en realidad ha sido de 34.984 pesetas.

Valladolid, 31 de Diciembre de 1981

Vº Bº
M. Rafaela Urueña
(Presidenta de la F. E. E.)

Carmen Conde
(Tesorera)

# «PLATERO KAJ MI»

Juan Ramón Jiménez komencas la verkadon «Platero kaj mi» ĉirkaŭ la jaro 1906, kiam li, post kelkaj jaroj en Madrido, revenas al Moguer, vilaĝo kie li naskiĝis. «Platero kaj mi» ne estas la komenco, sed la kulmino de lia proza verkado en lia unua epoko, kiam li trapasas tri precizajn etapojn, kies pintojn oni povas konsideri «Primeras prosas», «Baladas para después», kaj fine «Platero kaj mi».

«La memoro pri alia Moguer ligita al la ekzisto de tiu nova kaj al mia nova kono pri la kampo kaj homoj, determinis la libron» diras Juan Ramón, kaj certe oni povas konstati en la verko senĉesan kunmetadon de du sintenoj, tiu de la infano kaj tiu de la plenkreskulo.

Kiu legis la libron, tiu vere povis percepti, ke la ĉefaj instrucioj de la vilaĝo estas preskaŭ ĉiam traktataj ironie, satire aŭ humore. Ĉiu homŝvarmo, ne gravas en kia okazo, ĉagrenas kaj incitas la poeton, kiu ankaŭ eskapas for de la spektakloj kiuj estigas hipokritecon: la preĝejo dimanĉe, mortigo kaj ebriado ĉe la taŭroludoj, frivoleco kaj tumultemo ĉe la karnavaloj, perforteco kaj malamo ĉe la kokobataloj. Kaj kion diri rilate la kruelajn agojn kiuj aperas en diversaj ĉapitroj «La skabia hundo», «Sarito» ktp. Do, en «Platero kaj mi», same kiel en la Evangelioj, la mondo plenas de hipokriteco kaj perfortemo; temas pri mondo bezonanta redemptan idealon. Laŭlonge de la tuta verko oni perceptas ian paralelecon de la «pasiono» de «Platero kaj mi» kaj la pasiono de Kristo, (unuafoje en la dua ĉapitro, kiam la aŭtoro eniras la vilaĝon sur sia azeno).

«Sendube estas elementoj de klompleksa kristana alegorio en la bela andaluza elegio» klarigas Michael P. Predmore, kiu funde studis la verkon de Juan Ramón, kaj sur kies studoj mi bazis ĉi artikoleton. Restas nur aldoni du specimenajn ĉapitrojn de tiu mirinda verko, el kiu almenaŭ triono estas jam tradukita en Esperanto.

**Miguel Gutiérrez Aduriz**

# HISPANA INFLUO SUR PLANLINGVOJN: LA PERSONA A

**Bernard Golden**

En la «Plena Gramatiko de Esperanto», kiu troviĝas en la **Fundamento de Esperanto**, Zamenhof klare formulis la regulon por kazoj en sia lingvo.

> «Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo; la lasta estas ricevata el la nominativo per la aldono de la finiĝo **n**. La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj /la genitivo per **de**, la dativo per **al**, la ablativo per **per** aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco/».

Kial Zamenhof ne estis tute konsekvenca, formante **ĉiujn** kazojn en Esperanto helpe de prepozicioj? La nominativo ne prezentas problemon, ĉar ĝi ne estas markita. La sola anomalio estas la akuzativo, kiu estas markita per gramatika finaĵo. Ankau aliaj planlingvoj, kiu havas akuzativan kazon, indikas la rektan komplementon per finaĵo. Ekzemple, en Volapuko ĝi estas **i**: **fat,** «patro»; **patri,** «patron». Interesa demando nun prezentiĝas: ĉu ekzistas planlingvo, en kiu prepozicio estas uzata por esprimi la akuzativon?

Okaze de ekzameno de kelkaj post-Esperantaj planlingvaj projektoj, mi trovis du, kiuj uzas la prepozicion **a** antaŭ substantivoj kaj pronomoj, kiuj funkcias en frazoj kiel rektaj objektoj.

Unu el tiuj planlingvoj estas Hom-Idyomo ellaborita de C. Cárdenas kaj publikigita en 1921. Ĝi estas speco de Esperantido modifita per la aldono de pluraj leksikaj kaj strukturoj elementoj de la gepatra lingvo de la aŭtoro, la hispana. Laŭ mia konjekto, li estis kolombiano. En la leciono dediĉita al prepozicioj troviĝas jenaj ekzemplaj frazoj.

| | |
|---|---|
| **Maria dilektay a Julio.** | María amas Julion. |
| **Peter vulnerey a Jhon.** | Petro vundis Johanon. |

La dua lingvo, en kiu mi malkovris similan strukturon, estas Anglo-Lat, kies publikigaĵoj komencis aperi en la fruaj 1970-aj jaroj. Tiu ĉi planlingvo estas klasifikebla kiel hispanangla kompromisa lingvo. Ankaŭ ĝia aŭtoro, Robert Montero, estas el Kolombio, sed li nuntempe loĝas en Usono. En Anglo-Lat la akuzativo kutime ne estas markita, kaj pro tio la objekto devas sekvi la verbon same kiel en la angla. Tamen, kelkfoje la prepozicio **a** estas uzata.

| | |
|---|---|
| **Mi amat a miu sposa.** | Mi amas mian edzinon. |
| **Nosu mater amat a nos multi.** | Nia patrino amas nin multe. |
| **A kien vidit se?** | Kiun vi vidas? |

Cárdenas eksplicite klarigas, ke en Hom-Idyomo la uzo de **a** antaŭ substantivoj, kiuj estas objektoj de verboj, estas bezonata, ĉar tiu lingvo ne havas kazajn deklinaciojn, sed li limigas tiun uzon tiel, ke a aperas nur antaŭ rektaj objektoj indikantaj personojn kaj proprajn nomojn. Li apogas sin sur la konstruo de similaj frazoj en la hispana lingvo kiel: **Veo a Pedro; Mataron a un**

**hombre**. Male, Montero nenie en siaj gramatikaj klarigoj pri Anglo-Lat pritraktas la uzon de **a** antaŭ rektaj komplementoj, kiuj estas personoj. Estas evidente, ke la tiel nomata persona **a** de la hispana lingvo inspiris ambaŭ aŭtorojn senkonscie adopti tiun gramatikaĵon **kiun ili konfuzas kun aliaj funkcioj de la prepozicio a**. En la hispana lingvo, la persona **a** staras antaŭ substantivoj kaj pronomoj de personoj, bestoj kaj personigitaj objektoj kaj aferoj por eviti konfuzon kun la nominativo, kiam la vortordo en la frazo estas libera. Kreante siajn planlingvajn projektojn, Cárdenas kaj Montero ne povis liberigi sin de tiu gramatika apartaĵo de sia gepatra lingvo.

Laŭ mia scio, okazis nur unu provo enkonduki la personan **a** en Esperanton kaj plivastigi ties uzon kiel prepozician akuzativon. René de Saussure, la svislanda esperantisto-matematikisto, kiu formulis la principon de neceso kaj sufiĉo, post mallonga mielmonato en Esperantujo, komencis ludi per la zamenhofa lingvo, evoluigante diversajn Esperantidojn, kies formoj kaj reformoj ŝanĝiĝis en ĉiu sinsekva publikigaĵo. Verkante sub la pseŭdonimo Antido, kiun li uzis por defendi Esperanton kontraŭ Ido, de Saussure eldonis broŝuron en 1919, kies titolo estas **Nova formo de la Lingvo Internacia «Esperanto»**. La reguloj por la formado de kazoj en tiu ĉi nova Esperanto estas identaj kun tiuj cititaj el la Fundamenta gramatiko de Zamenhof kun ununura escepto: la akuzativo estas esprimata per helpo de la prepozicio **e**.

Sur la kovrilo de tiu broŝuro, ĉirkaŭantaj kvinpintan stelon, estas la vortoj «**E PACO ESPERAS**», kiuj en Esperanto signifas «pacon esperas». La sekvajn frazojn mi ĉerpis el la «Fundamento de la lingvo "Esperantido"».

| | |
|---|---|
| **Ĉu vi jam trovis via horloĝo?** | Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? |
| **Mi eĝi ankore ne serĉis** | Mi ankoraŭ ne serĉis ĝin. |
| **Mia frato diris al Stefano, ke li amas li pli ol e si mem.** | Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli ol sin mem. |
| **La tempo pasinta plu neniam revenos; e la tempo venonta neniu ankore konas.** | La tempo pasinta plu neniam revenos; la tempon venontan neniu ankoraŭ konas. |
| **Homo, ekiu oni devas juĝi, estas juĝoto.** | Homo, kiun oni devas juĝi, estas juĝoto. |

De Saussure en la antaŭparolo de sia verko pri Esperantido, klarigas, ke li eliminis la devigan akuzativon, sekvante la ekzemplon de Ido, kaj li anstataŭis ĝin per la prepozicio **e**, analoga al la hispana prepozicio **a**. Sed tiu ĉi prepozicio estas uzata nur en la kazo, kie la vortordo de la frazo ne estas la natura ordo de subjekto, verbo kaj objekto.

Pro la malstabileco de la lingvaj ideoj de De Saussure, ankaŭ tiu regulo inversiĝis. En sekva surpapera lingvoprojekto, la Nov-Esperanto de 1926, li reenkondukis la akuzativan kazon esprimatan per gramatika finaĵo ĉi-foje la litero **u**.

| | |
|---|---|
| **Mi vidas leonu.** | Mi vidas leonon. |
| **Mi amas la patru.** | Mi amas la patron. |
| **Bona matenu!** | Bonan matenon! |
| **Vi prenis viaŭ.** | Vi prenis vian. |
| **Mi iras domeŭ /en domu/.** | Mi iras domen /en domon/. |
| **Donoy al la birdon aqueu.** | Donu al la birdoj akvon. |

Rimarku, ke la finaĵo **u** anstataŭas la **o** de la nominativo, kiu ne funkcias kiel markilo de substantivoj kiel en Esperanto; fakte, laŭ de Saussure substantivoj havas kvar finaĵojn: **o** /nominativo/, **u** /akuzativo/, **on** /nomina-

tivo-pluralo/ kaj **un** /akuzativo-pluralo/. Kontraŭe al Esperanto, la akuzativa pluralo formiĝas per aldono de la litero **n** en la akuzativa **u**.

**La patron amas la filun.** La patroj amas la filojn.

Tiu **u**-akuzativo restis en la plumodifitaj projektoj de de Saussure, verŝajne ĝis la fino de lia planlingvistika agado. Kvankam la prepozicia akuzativo faras la kazsistemon pli simetria, ĝi estas iom fremda, aperanta tre malofte en la hindeŭropaj lingvoj; krom la hispana, nur la rumana kaj la afrikansa markas la akuzativon per prepozicio.

Se oni volas spekulativi, oni povas meti jenan demandon: se d-ro Zamenhof estus estinta parolanto de la hispana lingvo, kiel Cárdenas kaj Montero, ĉu li estus enkondukinta la prepozician akuzativon en Esperanton?

**Konsultitaj verkoj**


CARDENAS, C. 1923. **Hom-Idyomo.** 2-a eldono. Leipzig.
MONTERO, R. s. d. **Anglo-Lat**. /8 multobligitaj lecionoj/. San Diego, California, Usono.
ANTIDO /= René de Saussure/. 1919. **Nova formo de la Lingvo Internacia «Esperanto»**. 1-a eldono. Bern.
1919. **Nova formo de la Lingvo Internacia «Esperanto»**. 3-a eldono, mallongigita. Bern.
1926. **Fundamenta Krestomatio de la Internacia Lingvo Nov-Esperanto.** 2-a eldono. Bern.
1928. **Fundamenta Krestomatio de la Internacia Lingvo Nov-Esperanto.** 1-a parto. Bern.
1929. **Idiome Mondial**: «**Nov-Esperanto**». Bern.
FUNDAMENTA KRESTOMATIO de la lingvo Esperanto. 17-eldono. 1954. Rickmansworth, Anglio.


# FILATELA EKSPOZICIO

**Esperanta sekcio de Filatela Rondo** apud urbo Trebiŝov aranĝos en septembro 1981-a grandformatan filatelan ekspozicion de ĉiuj poŝtaĵoj el la tuta mondo, havantan esperantligvan tekston. La celo de nia ekspozicio estas prezenti Esperanton kiel vigle vivantan lingvon, ke Esperanto kaj sia idealo reale vivas inter ĉiuj homoj kiuj parolas kaj skribas en la internacia lingvo Esperanto. Ni volas prezenti nian korespondaĵojn ankaŭ kiel ilon por la mondpaco, interkompreniĝo kaj amikeco inter la homaro.

Ni intencas ankaŭ kompletigi nian kolekton pere de viaj salutleteroj poŝtstampoj kun esperantligva teksto, poŝtkovertoj, E-Glumarkoj, insignoj, k.t.p.

Ĉiu skribanto kaj subtenanto ricevos de ni dankrespondon, kaj katalogon de «Esperanta Filatelista Ekspozicio 1981» je temo POSTAĴO EN ESPERANTA KORESPONDADO.

La esperantistoj havantaj intereson ekspozicii en sia lando nian filatelistan kolekton, skribu oficialan petskribon al nia landa «Asocio de Esperantistoj en SSR» Sobotské nam. 1735. ĈS-05801 POPRAD (Ĉeĥoslovakujo).

Ĉiuj rekomenditaj sendajoj por la ekspozicio sendu al: S-ano Friedrich Zold, ĈS-07632 BORŜA ĉ 368 (Ĉeĥoslovakujo).

# MURCIA, URBO DE LA XLI-a HISPANA ESPERANTO KONGRESO



La Murcia regiono situas en la sudorienta parto de la iberia duoninsulo, ĝia surfaco estas 26.175 kvadrataj kilometroj kaj la denseco po kvadrata kilometro estas 46 enloĝantoj. La zono pli proksima al la maro estas pli seka ol interne, sed tiu sekeco mildiĝas interne de la regiono. En la murcia regiono ekzistas kelkaj el la plej gravaj naturrifuĝejoj kiuj enhavas pentraĵojn, karakterizajn de ĉi tiu regiono.

Murcia estis definitive aneksita al la kastilia regno, la jaron 1265-a kaj ĉi tiu aneksado disvastigis tra la tuta regiono la gotikan arton, laŭ la kastilia konstrumaniero, sed kelkfoje ĝi estas miksita kun kataluna influo, kiel ni povas konstati vidante la Katedralon de Murcia. La renesanca periodo estas bone reprezentata per diversaj konstruaĵoj, sed estis sendube dum la baroka periodo kiam aperas la unuaj murciaj skulptistoj kaj pentristoj, kiuj atingis grandan famon, kaj inter kiuj elstaras la genia skulptisto Francisco Salcillo aŭ Salzillo, kies plej gravajn skulptaĵojn, oni povas miri en la Muzeo al li dediĉata.

La konstruaĵo kie estas la Muzeo Salzillo situas apud la Preĝejo Jesuo kaj en ĝi estas gardataj la religiaj skulptaĵoj de tiu fama murcia skulptisto, kiuj dum la solenaĵoj de la Sankta Semajno trapasas la stratoj de la urbo.

En la Muzeo, oni povas vidi: La Arestadon, en kiu estas mirinda la psikologia profundeco de la kapo de Jesuo kaj Judaso; La Lastan Vespermanĝon, kie elstaras la esprimoj de la manoj de la diversaj figuroj kiuj konsistigas tiun grupon; La Dolorantinon kies skulptaĵo montras la serenan kaj trankvilan mienon de la Sanktega Virgulino en sia profunda doloro; La Preĝon en la Horto, kie estas ideala la figuro de la anĝelo kiu kuraĝigas Jesuon k. t. p.

Aliflanke estas ege kurioza la figuroj de la Sankta Kripo, skulptitaj laŭ la itala maniero, kaj inter ili la plej gravaj estis skulptitaj de Salzillo mem.

Dum via vizito al Murcia, ĉu okaze de la Kongreso, ĉu en alia okazo, mi rekomendas vin nepre viziti tiun muzeon kaj certe vi konstatos, per viaj propraj okuloj, ke tion kion mi diras estas nur pala kopio de la realaĵo.

**L. HERNANDEZ**

# 66-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO




Sub la Alta Protektado de la Prezidento de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo, Joao Baptista de Oliveira Figueiredo, okazos por la unua fojo en la historio de la Universalaj Kongresoj de Esperanto, la ĉijara U. K. en la Suda Hemisferio.

Krom la Prezidento de la Respubliko, al la Honora Komitato apartenas elstaraj personoj de la politika, kultura kaj socia vivo de Brazilo.

La Loka Kongresa Komitato estas prezidata de Senatano José Lins de Albuquerque, Vicestro de la reganta partio en la brazila Senato, kaj sekve, tre grava persono en la politika vivo de la lando.

La Departamento pri Turismo de la Federacia Distrikto (DETUR) disponigis por la kongreso, tute senpaga, la kongrescentron de Brazilio, kaj la presejo de la Senato komplezeme presis por la Kongreso, la 36-an paĝan ilustritan Duan Bultenon. La ĉefa temo de la Kongreso estos: **Kulturoj kaj Lingvoj: Pontoj kaj Baroj**, tre taŭga temo por Brazilo, kunfandiĝejo de kulturoj kaj popoloj el pluraj kontinentoj.

Dum la kongressemajno okazos du duontagaj urbaj rondveturadoj tra Brazilio, plurfoje, unu kun emfazo al la socikulturaj kaj arkitekturaj aspektoj de la plej moderna ĉefurbo de la mondo, la alia kun pli forta rigardo al ĝia historio.

Merkrede, la kongresanoj povos elekti inter ekskursi al la akvofalo Itikira, populare konata kiel «Fianĉina Vualo», aŭ al la urbo Cristalina ĉefa centro de la ŝtato Goias por la ekspluatado kaj komercado de juvelŝtonoj.

Okaze de la U. K. la brazila poŝto eldonos poŝtmarkon kiu aperos antaŭ la komenciĝo de la U. K.

Al tiuj kiuj ankoraŭ ne kuraĝigis aliĝi al la Kongreso pro la temperaturo, ni informas ilin ke la U. K. okazos ne en somero, sed en la amerika vintro. Tio ne signifas danĝero de neĝo, sed garantias ke la varmo ne estos multe pli ol dum somero en la norda Eŭropo. Kutime, la temperaturo dum la brazila vintro varias inter 14 kaj 25 gradoj.

# SOCIOS PROTECTORES EN 1981

| | |
|---|---|
| 1.—Francisca J. Yruegas del Río | Nº 719 |
| 2.—Mº Rafaela Urueña Alvarez | Nº 1904 |
| 3.—Grupo Esperantista de Valencia | Nº 1187 |
| 4.—Sociedad Esperantista de Tenerife | Nº 1221 |
| 5.—Miguel Termes de la Torre | Nº 2510 |
| 6.—Sociedad Esperantista «Frateco» | Nº 134 |
| 7.—Rafael Herrero García | Nº 108 |
| 8.—Matilde Pimentel | Nº 2531 |
| 9.—Trinidad Camarasa | Nº 2529 |
| 10.—Esperanto Fako «Juventud Tarras.» | Nº 80 |

## DONATIVOS

| | | |
|---|---|---|
| Antonio Gamboa y Sánchez .................... | 25.000 | Pts. |
| Giordano Moya Escayola ................... | 250 | « |
| Pedro Alcedo Pico .......................... | 100 | « |
| Esperanto Grupo Frateco ................... | 500 | « |
| José Sardá ....................................... | 250 | « |
| Salvador Gumá ................................. | 250 | « |
| Manuel Ruiz ..................................... | 150 | « |
| Anónimo ......................................... | 200 | « |
| Suma y sigue .............................. | 26.500 | « |

## DONATIVO PARA EL F. A. L. P.

| | |
|---|---|
| Florentino Fuentes .............................. | 500 Pts. |

# INTERNACIA ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN BILBAO

Okaze de la 75-a datreveno de la fondiĝo de la Bilbao-a Esperanto Grupo, oni aranĝos gravan Internacian renkontiĝon de la 18-a ĝis la 21-a de junio. La aliĝo estas tute senpaga, kaj la programo alloga. Ili havas je la dispono de la partoprenontoj ĝis 50 ĉambrojn dulitajn en la Universitata Restadejo «Esteban Terradas» en la centra parto de la urbo. Ankaŭ la Grupo de Bilbao proponas al ni belan ekskurson al la fama urbo **Gernika**, kaj prelegon en hispana lingvo en centra ekspozicia halo de banko.

Grava programero de tiu Renkontiĝo estos la ekspozicio pri la vivo de la Esperantista Grupo de Bilbao, kiu estos vizitebla en halo de centra Banko. En la ekspozicio, la vizitantoj povos vidi diversajn librojn en esperanto kiel pruvo de la internacieco de nia lingvo.

Se ni ĉiuj deziras ke la Renkontiĝo sukcesu, ni devas partopreni ĉar niaj karaj samideanoj de Bilbao kaj iliaj klopodoj por la sukceso meritas nian apogon kaj partoprenon.

Informu pri via alveno al Grupo Esperantista, Barrencalle Barrena 7, BILBAO-5.

# NI KOMENTU POEZION

## INDIGNO KONTRAŬ...?

Ŝi sidas kun aplombo de nescio
en aŭtobuso. La vizaĝo blankas
pro pudromasko; sed kolor' ne mankas
sur ĝi, ĉar jen skarlata strio

pristridas lipojn, kaj palpebrojn io
bluigas. Ŝin sinjoroj flankas
ridete - ĉar l'aspekto strangas.
Farunvizaĝ! Bizara travestio

pri belo! Tutan tagon ŝi servutis
senŝminka, turpe pala en uzino;
al brua hejm' prevenis, manĝon glutis;
ŝin vestis strataŝike, de l' rutino

ekfuĝis kelkajn horojn. Nun ŝi sidas,
Dum porkoku burĝoj ŝin pririda.

**John Francis**
**(La Nica Literatura Revuo-Dec. 56)**

(1/6). Virina portreto, elvokanta la povran klaŭnon pentrita de Rouault. La koloroj estas krudaj: blanko, ruĝo kaj bluo maskas inan vizaĝon. «... skarlata strio - pristridas lipojn», kaj la dura fonetiko de la konsonantaj grupoj (sk-str-prist) gratas nian orelon kaj nian menson.

Pri ŝia spirito, unusola negativa indico: «kun aplombo de nescio»; ŝi, do, estas interne vakua, stulta.

Sume, fizika kaj spirita portreto kruela, senkompata, bezonanta adekvatan enkadrigon. Kaj jen la enkadrigo: (6/7) «Ŝin sinjoroj flankas - ridete». Lakone, vortspare, tiu nova ina Kristo aperas flankita de stultaj ridetantaj sinjoroj. Ne de homoj, fratoj, kunuloj, personoj... sed de «sinjoroj», tio estas, apartaj sociaj estaĵoj. Ili ne kunestas, ne kunvojaĝas, ne kun—; ili nur «flankas». Kaj flankas «ridete». moke, superece.

Loko? Aŭtobuso: plej malvarma, senhoma, senanima kaj senradika ejo imagebla.

Momento? Nun, antaŭ ni mem. —As verbaj formoj. Kaj ni notu bone la distancon, kiu ekzistas inter la bildo kaj ni. La verkisto ŝajnas pentri el malproksime, sendetale, per larĝaj strekoj, kaj ne permesas al ni (nek al ŝi mem), alproksimiĝi al tiu stranga «ŝi».

(8/9). Jen du separigaj versoj, kvazaŭ resumantaj la tutan portreton. Ĉi tie la ino fariĝas pupo ridinda kaj senanima.

(9/13). Tempo pasinta. Kvin korfrapaj verboj: «servutis, glutis, ekfuĝis». Esprimoj ligiĝas intime: «tutan tagon ŝi servutis» = longajn, senfinajn

laborhorojn. «Turpe pala» = laceco, malsano divenigas. «En uzino» = en plej dura, nevirina laborloko. «Ŝin vestis strataŝike» = jes ja, laŭ la stilo de la pudromasko. «Ŝi al brua hejm' revenis» = Ne al varma, vera familia hejmo. «Brua hejm'» sugestas krieman patrinon, kvereleman frataron.

Kaj la dektria verso ripetas ĝuste la komencajn vortojn de la poemo: «Nun ŝi sidas». Tiel la fera rutina cirklo tenajlas ŝin. La aŭtoro, per kruelaj, fridaj vortoj, pentris groteskan, tragikan, senkompatan bildon.

Ŝi (li neniam diras kiu estas tia «ŝi») estas sola, estas nescia, estas ridinda. Li ne donas eĉ unu vorton permesantan al ni meti iom da kompato sur «ŝi». Li rakontas pri «ŝi» el malproksime, akcentante la distancon. Ŝi rakontas pri «ŝi» el malproksime, akcentante la distancon. Ŝi estas ĉiam kaj nur «ŝi», kaj ni notu la intencan forigon de la difinita artikolo antaŭ la amaso de substantivoj en la poemo. Ĉi tie, la stilistika kaj psikologia rolo de «la» estus determini, fiksi la substantivojn por ni, sed la poeto majstre forigas ĝin, por reliefigi la distancon inter la leganto kaj tiu nekonata «ŝi».

Poste, enirante en la dekvaran verson, la poeto ŝanĝas sian vidpunkton. Nun, la gramatika subjekto estas alia. La subjekto taksas ŝin. La subjekto ignoras la pezan servutadon en uzino, la bruan hejmon, la sengustan manĝon, la ekfuĝon. Ĝi kapablas nur vidi maskopudron kaj travestion. Kaj tia subjekto (la «porkokulaj burĝoj») priridas la malfeliĉulinon.

Trafa, subjektiva elekto de leksiko kaj esprimoj, vortordo majstre aranĝita, kun inversioj kiuj vibrigas la parolĉenon kaj elstarigas la valoron kaj signifon de la versa akcentado. (Notu la mornan efekton de la akcentika «u» en la versoj 9-10-11).

Akra indigno kontaŭ sociordo produktanta tian hom-estaĵon estas la temo de la kompozicio. Kaj sub tia indigno fluas latenta kompato pri «Ŝi», kiu ne kapablas konscii pri la abomeninda puto kie si vivaĉas.

La verko estas elizabeta soneto, rimanta ABBA ABBA CDCD, EE, dekunusilaba, escepte en la versoj 4-6-7.

La pensunuoj ne akordiĝas al la mezuro de versoj kaj transpaŝas ilin, kaj tio forte potencigas la konvulsan marŝadon de la centra ideo tra la tuta poemo.

La titolo «Indigno kontraú...?», estas retorika demando, celanta krei propran respondon en la animo de la leganto.

**JES**

---

# Scienca Komisiono de Hungara Esperanto - Asocio Budapest, Pf. 193. H-1368

Ĉi-jare endrake de la tradicia Somera Esperanto-Universitato (SEU) okazos ankaŭ ekologia seminario, subtenata de la Scienca Komisiono de HEA.

Laŭplane ĝin partoprenos unuavice fakuloj, okupiĝantaj pri diversaj terenoj de ekologio. Krome estos bonvenaj ĉiuj, kiuj serioze interesiĝas pri la nuntempaj problemoj de medioprotektado. Enkadre de la ĝenerala temaro estos speciale pridiskutataj du ĉeftemoj: 1/ la plastoj kaj la medioprotektado, kaj 2/ la transformado de la medio kaj la birdaro. Krome estos pritraktataj planoj pri eventuala aranĝado de pli granda ekologia konferenco.

La 19-a SEU okazos inter la 5-a kaj 11-a de julio, 1981, en la ĉarma hungara urbeto Gyula.

# NIAJ GRUPOJ

## CENTRA OFICEJO DE H. E. F. EN MADRID

La Oficejo de H. E. F. en Madrido organizis plurajn ekspoziciojn en diversaj kvartaloj de la ĉefurbo, kun la celo diskonigi Esperanton inter la madridanoj. La unua ekspozicio okaziĝis de la 22-a ĝis la 25-a de januaro en Paseo de Pontones-Arganzuela, kaj la lasta, fine de la monato marto, okaziĝis en Dehesa de la Villa - Moncloa.

Estas rimarkinda ke dum la ekspozicio aranĝita en Ministreles (centro de Madrido) la hispana televido filmis diversajn angulojn de la ekspozicio, kio kun intervjuo al la Prezidantino de H. E. F. kaj kun praktika kursvidaĵo en la Madrida E. Liceo, apris en la televidaj programoj «COSAS» kaj «7 DIAS».

Oni devas mencii ke tiuj ĉi ekspozicioj estas eblaj dank'al la klopodoj kaj laboro de volontulaj esperantistoj, plejparte membroj de H. E. F., kiuj sub la gvidado de S-ro González Aboín, nuna reprezentanto de la estraro de H. E. F. en la Centra Oficejo, kaj pere de mondonacoj de kelkaj madridaj federacianoj, sukcesis ke nia Centra Oficejo funkciu bone. Ili jam preparas aliajn ekspoziciojn kaj speciale ili intencas organizi Internacian Ekspozicion, por kio ili dankus la sendon de materialo, kiu estos redonebla al ĉiuj pruntedonontoj.

Ankaŭ estas menciinda, ke ili trovis la helpon de la Madrida Urbokonsilantaro, kiu proponis al ili la ejojn senpage, kaj presigis afisojn pri la ekspozicioj, ankaŭ senpage.

## ZARAGOZA

En la Ĝenerala Kunsido de la Esperantista Societo «Frateco» de la pasinta 15-a de februaro, oni sanĝis la estraron, kaj S-ano Victor Ortiz Gratal, membro de la estraro de H. E. F. estis elektita Prezidanto de la Grupo, anstataŭante al S-ano D-ro Sancho Izquierdo, kiu dum multaj jaroj prezidis «Frateco-n» kaj kiu nun estas Honora Prezidanto de la Grupo.

Ankaŭ en ĉi tiu kunsido estis elektita Komisiono kiu studos kaj preparos la projekton por memorigi la 75-an datrevenon de la fondiĝo de «Frateco» kaj la Nacian Kongreson antaŭvidita por 1983.

(Laŭ Cirkulero de la Grupo)

## BILBAO

Profitante la ĉeesto inter ni de la eksprezidanto de nia Grupo S-ro Alberto Díaz Chapartegui, oni aranĝis prelegon pri «Curiosidades del Espacio» la 12-an de marto, je la 8-a vespere. La prelegon sekvis kolokvo.

(Laŭ Cirkulero de la Grupo)

## SEVILLA

Nia entuziasma samideano Rafael Avalos Fernández komencis Elementan Kurson en Lora del Rio (Sevilla) kun partopreno de 20 personoj.

## VALLADOLID

**SEMAJNO PRI INTERNACIA AMIKECO.**—La **Esperanto-Grupo «Fido kaj Espero»** festis inde la Semajnon pri Internacia Amikeco per diversaj aranĝoj. Unue, la 19-an de februaro, en la sidejo de la Grupo komenciĝis la aranĝoj per trafaj vortoj de la Prezidanto S-ano Luis Martín Herrero, kiu elstarigis la signifon de ĉi tiu Semajno por la tutmonda esperantistaro, kaj prezentis al la ĉeestantaro la prelegonton S-ro Vicente de la Parte.

S-ano de la Parte komencis sian paroladon en hispana lingvo, elstarigante la grandan nombron de esperantistoj kiuj en la tuta mondo apartenas al la movado, sed rimarkigante ke en tiu aspekto la ciferoj estas ĉiam malfacile pruveblaj. Oni povas konstati nur tiun nombron per faktoj kiel la subskriboj de dokumento sendita antaŭ jaroj, al la Unuiĝintaj Nacioj petanta la enkondukon de Esperanto en la Internaciajn Rilatojn, aŭ pere de la nombro de aĉetantoj de esperantaj libroj. Sed pli videbla estas la alĉeesto de esperantistoj al la Universalaj Kongresoj, aŭ la grava nombro de radiodissendoj ekzistantaj tra la mondo, esperantaj revuoj, ĵurnaloj, k. t. p.

Tamen, ĝis nun la esperantistoj laboras tro individue, kaj konsekvence ili restis iom izolitaj, kvankam la movado havis elstarajn unuopulojn, kiel la Prezidentojn Jonas de Aŭstrujo kaj Tito-n de Jugoslavujo, jam forpasintajn. Nuntempe oni eklaboras en pli vasta kampo, enirante en la Internaciajn Organizojn kaj ni ne devas forgesi ke Esperanto estas lingvo de komunumo, permesanta identigan evoluon per propra kulturo, kiu jam marŝas sendepende de la sorto de la Internacia Lingvo mem.

Tondra aplaŭdado premiis la vortojn de nia samideano.

La 20-an de februaro, kaj en la sama sidejo, S-ano Dativo Blanco prelegis esperantlingve pri la temo «Amikeco kaj Malevoluo». Post enkondukaj vortoj de nia Prezidanto, rememorigante la ĉiaman aktivecon de S-ano Blanco, fondinto de la E-Grupo en Palencio kaj nuntempa Sekretario de nia Grupo, la preleganto komencis dankante la vortojn de la Prezidanto kaj rimarkigante la rilatojn inter du diversaj agadoj, t. e. inter la esperantista amikeco (Semajno pri Internacia Amikeco) kaj la kampanjo por la malriĉaj landoj (Kampanjo kontraŭ la Malsato en la Mondo). Li montris, per statistikoj, la milionojn da malsatantaj personoj kiuj en la jaro 2000-a pligrandiĝos terure. Kio mankas en la mondo? Evidente mankas la amikeco.

La naturriĉaĵoj de la mondo estas ankoraŭ grandparte ne esploritaj la ekzistanta nutraĵo estas abunda sed malbone distribuata. Dum en la riĉaj landoj oni manĝas tro multe, en la neevoluintaj landoj la homoj ne havas eĉ la necesajn nutraĵojn. Tamen kelkaj malriĉaj landoj eksportas cerealojn al la industriaj landoj, kiuj nur malmulte mildigas la malsaton de la unuaj. Oni bezonas ŝanĝi la strukturojn. La riĉaj landoj faras leĝojn por sia propra profito kaj helpas «amike» la Trian Mondon per kelkaj rimedoj sed ne ŝanĝante la Internacian Ordon. Tio ne signifas amikecon aŭ almenaŭ ĝi ne estas sufiĉa. Por pruvi tiun situacion, la preleganto montris kvardekon da diapozitivoj pri la t. n. Tria Mondo kaj ĝiaj problemoj, kiuj substrekis la gravecon de tiu temo. Post tiu grava parolado kaj dokumento la preleganto estis premiita per multaj aplaŭdoj.

La dimacon 22-an, okazis Santa Meso kuncelebrita en Esperanto de Pastroj Jonás ;castro, Alejandro

Gómez de Pedro kaj Miguel Gallego García kaj ni ĉiuj kantis kelkajn partojn en esperanto unuafoje en la vivo de nia loka Grupo.

Fine, frata manĝado metis la finan punkton al tiuj aranĝoj organizitaj de nia Grupo.

**VALENCIA**

**Leĝa Normaligo kaj Ĝenerala Kunveno de la Grupo.**

Je la komenco de novembro, nia grupo normaligis sian leĝan situacion per la aprobo fare de la Provincestro de Valencio de la novaj statutoj, ĉar antaŭe, nia Grupo apartenis al ŝtata kultura organizo kiu pro la politikŝanĝoj de la jaro 1975, ĝi transformiĝis.

La 16-an de januaro de 1980, okazis la unua ĝenerala kunveno de la G. E. V. post sia normaligo. Tie oni elektis la novan estraron; kiel prezidanto estis elektita la veterana esperantisto s-ro Johano Bosch Fornals.

Sekretario de G. E. V.
**Carlos N. Moya**

**MADRID**

La 12-an de Februaro kaj en la Fakultato pri Filologio de la Centra Universitato, S-ro Augusto Casquero kaj S-ro Juan Carlos Ruiz Sierra prelegis pri la temo «Esperanto, kiel solvo al la internacia lingva kaoso».

# TIEL FUNKCIAS LA SUBTERAJ AKVOFLUOJ

## Jurnalo: «El Pais»
## Tradukis: Luis Martín Herrero

De antaŭ milionoj da jaroj la pluvo falas surteren. Parto de la akvo iras al la subtero; kaj formiĝas rivereto j kaj riveroj. La tero de certaj regionoj estas formita de kalkaj rokoj. La pluva akvo iom acida povas dissolvi ilin malrapide. Tiuj ĉi rokoj havas fendojn: la diaklazoj. Dum ĝi dissolvis la kalkon ĝi kreis reton da putoj, karstajputoj, galerioj. Kaj la eniĝinta akvo kuniĝis formante verajn subterajn fluojn. La muroj de la grotoj estas tegitaj de kelkaj sedimentoj. Ekzistas puraj formoj de kristalecaj sedimentoj. La stalaktitoj pendantaj de sub la plafonoj formiĝas tre malrapide: kvin centimetroj dum ok mil jaroj. La stalagmitoj formitaj sur la planko leviĝas ĝis la renkontiĝo kun la stalaktitoj kaj formas per la kuniĝo verajn kolonojn tre belajn.

La vojo de tiuj akvofluoj povas esti bremsita de naturaj digoj kiuj ŝtuparforme kreas serion da lagetoj. Fine de sia subtera fluado la akvo eliras al la lumo. Per tempo, la fluo povas penetri pli profunden kreante novan rivereton pli sube. En la grotoj vivas insektoj, krustuloj, vermoj, rampuloj. Ankaŭ en tiu natura rifuĝejo vivis la prahistoriaj homoj dum pluraj epokoj kaj lasis postsignojn de sia paŝo pentrante mirindajn freskojn sur la muroj. Kelkaj el ili ankoraŭ konserviĝas.

# INTERNACIAJ KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ

## FERIADO EN MALTO MEZE DE LA MEDITERANEO

Esperanto Societo (Malto) invitas vin al la Internacia Turisma Semajno okaze de la 20-jara datreveno de ĝia fondiĝo, de la 1-a ĝis la 7-a de septembro 1981-a. La programo antaŭvidas kulturajn ekskursojn, i.a. al la famaj maltaj pratemploj, kaj al la ĉefurboj de Malto: Mdina la malnova, kaj Valletta, la nova ĉefurbo; prelegojn kaj filmojn pri la historio kaj literaturo de Malto; distrajn vesperojn k.t.p.

La kotizo por la tuta semajno estas 330 guldenoj inkluzivante tranoktojn, tri manĝojn ĉiutage, ekskursojn kaj la vojaĝon el la flughaveno aŭ haveno al la renkontejo kaj reen.

Mendu informojn kaj aliĝilon al: ESPERANTO SOCIETO (Malto)

«La Espero», New Street off Qormi Road
St. Venera (Malta)

## 15-a INTERNACIA KONFERENCO DE I. L. E. I.

Ĝi okazos en Godollo - Budapest (Hungarujo) de la 11-a ĝis la 21-a de Julio. Mendu tuj la aliĝilon al: ILEI Colegio Nacional. Cursos de Esperanto. CALLOSA DE SEGURA (Alicante).

## IX RENKONTIĜO DE PORTUGALAJ ESPERANTISTOJ

De la 18-a ĝis la 21-a de junio okazos en Faro (Portugalujo) la IX Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj, en la Domo de la Distrikta Asembleo de Faro. Dum la renkontiĝo oni aranĝos kulturan vesperon kaj prelegojn, ekskurson al la ruinoj de Milreu, Estoi, Moncarapacho, Fuzeta kaj enŝipigon al la insulo Armona.

Mendu aliĝilojn al la P. E. A. - Rua Dr. Joao Couto, 6
1500 LISBOA (Portugalujo)

## EKUMENA KONGRESO DE IKUE KAJ KELI

La Kongreso okazos de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto en la Konferencejo «De Bron» apud Zwolle en Nederlando.

La adreso estas: «De Bron», Oude Oever 10, 7722 VE Dalfsen (Ov).

## PORINFANA AMIKECA RENKONTIĜO-1981-a

Okazonta de la 31-a de julio ĝis la 10-a de aŭgusto en Balatonfüred (Hungarujo). La temo kaj celo de tiu ĉi Renkontiĝo estas «krei internacian amikecon inter infanoj kiuj jam lernas Esperanton; montri al ne-esperantistoj ke la Internacia Lingvo estas perfekta ilo por kreskigi tian amikecon».

La partoprenontoj devas esti: **Infanoj** inter 8 kaj 13 jaraĝaj, kiuj deziras sincere plibonigi sian Esperanton kaj amikiĝi kun fremduloj; **Helpantoj** (junuloj pli ol 13 jaraĝai por helpi la infanojn); **Gvidantoj** (plenkreskuloj esperantistoj) kiuj estos pretaj helpi diversmaniere; aŭ **Denaskaj esperantistoj** malpli ol 8 jaraĝaj kies patro aŭ patrino akompanos ilin.

Petu informojn kaj aliĝilojn al: Érnő CSISZAR - Kulich Gyula u. 25 V. 16, 8100 VARPALOTA (Hungario).

## LABORBRIGADO 81

La laborbrigado okazos en la vilaĝeto Ahlersbach (Germanujo), de la 28-a de junio ĝis la 11-a de julio. Temas pri malnova renovigenda bieno kiu apartenas al privatuloj, kaj kiuj ofertas al ni senkostan restadon kontraŭ kunlaboro. Pli da informojn petu al: Eki Woite, An der Kirche 33. - D-6115 MUNSTER (FR Germanio).

# ESPERANTLINGVA ANTOLOGIO DE LA MONDA POEZIO

## - Ĉefverko de Kalocsay aperonta -

En oktobro de 1981 —omaĝe al la 90-a datreveno de la naskiĝo de Kálmán Kalocsay, eble la plej elstara tradukisto de la Internacia Ligvo— en Budapeŝto aperos la granda poezia antologio TUTMONDA SONORO, kiu enhavos ĉiujn ĝis nun ne aperintajn poemtradukojn de la Budapeŝta grandulo.

TUTMONDA SONORO enhavos 581 poemojn de 185 poetoj, verkintaj en 30 lingvoj, dum entute kvarmil jaroj. Kalocsay travagis la tutan riĉan kampon de la monda poezio, elektis la plej belajn florojn de tiu kampo, kaj —per la helpo de diverslingvaj esperantistoj— li transplantis tiujn plej belajn florojn en nian Esperantan bedon. Dum ĉ. 60 jaroj li laboris super tiu ĉi granda verko, kiu aperos en **du binditaj volumoj, entute sur ĉ. 700 paĝoj.**

Dum sia vagado li ne evitis Hispanion, kaj dank' la tio ankaŭ la hispana pezio aperas specimene en la verko. Li tradukis al Esperanto poemojn de Sankta Teresa de Avila, Argensola, Góngora, Lope de Vega kaj Bécquer. Hispanaj esperantistoj verŝajne volonte legos ankaŭ fragmenton el la hispan-fona dramo «Cido» de la franco Corneille.

Antaŭ kelka tempo la Estraro de UEA akceptis la verkon en la prestigan serion «Oriento-Okcidento».

La prezo de la luksa duvoluma verko estos 2450 pesetoj. Tamen, ekzistas favora mendo antaŭmendi gin kontraŭ nur 2000 pesetoj kiu sumo inkluzivas ankaŭ sendkostojn.

LIBRO-SERVO DE H. E. F. kaj
Llibreria Esperanto

Oni notu, ke la eblo de favorpreza antaŭmendo kun antaŭpago validas nur ĝis la **30-a de junio 1981**. Hungara Esperanto-Asocio garantias, ke ĉiuj antaŭpagintoj ricevos la libron ce sia hejma adreso ĝis la fino de oktobro!

**V. Benczik**



# RECENZOJ, RECENZOJ, RECENZOJ

LA IGLESIA Y EL PROBLEMA DE LA LENGUA AUXILIAR INTERNACIONAL de Jerzy Korytkowiski kun antaŭparolo de M. D. Chenu.—La eldonejo «Claret» el Barcelona aperigis ĉi tiun gravan verkon kies titolo jam plene anoncas la enhavon de la 142-paĝa libro, tre bone kaj klare presita.

La aŭtoro funde analizas la problemon de la internacia komunikado de la katolika eklezio dum la jarcentoj kaj post varia kaj kompleta studado sub ĉiuj aspektoj, venas al la racia konkludo ke la internacia lingvo Esperanto estas la perfekta solvo de la problemo.

Vere inda kaj leginda verko por ĉiu esperantisto kiu emas koni la pravajn argumentojn de nia strebado por tutmonda kompreniĝo kaj ankaŭ tre taŭga por la religiaj medioj ĉar ĝi prave pruvas ke nia nobla idealo estas sukcesinda. Ke ĝi okupu indan lokon je nia bretaro post atenta tralegado.

**Ramón MOLERA**

## «LA RENESANCA PERIODO» de Gaston Waringhien

**Eldono Gabrielli, Ascoli Piceno, Italio, 1977.**
**20 x 14 cmtj. 205 pĝj. Preso kaj bindo tre bonaj**

La franca Renesanco, tardiva, komencas je la fino de la XV-a jarcento kaj etendiĝas dum la tuta XVI-a, tiel preparante la terenon por la Ora Epoko de la literaturo en Francujo en la XVII-a jarcento.

Elstaras inter la poetoj de tiu período Marot, Sceve, Labé, Ronsard, du Bellay kaj aliaj, ĉi lastaj grupigitaj de Waringhien kiel «la epigonoj». El ili ĉiuj, Waringhien prezentas, france kaj esperante, la plej signifajn: Du Bellay kaj Ronsard, kune kun versoj de francaj reĝoj kaj altranguloj («Princaj Distroj»), kaj versoj de la t. n. epigonoj.

Fronte al fronte aperas la franca originalo kaj la traduko de Waringhien. Abundaj notoj klarigas historiajn, ortografiajn kaj lingvajn punktojn. Mallonga kaj trafa «Enkonduko» situas la leganton antaŭ la ĝenerala panoramo de la epoko; etaj biografioj de du Bellay kaj Ronsard (la plej grava el ili ĉiuj), kaj komentoj pri ilia literatura signifo kaj valoro en la franca Parnaso, helpas la leganton por pli profunde veni al la kono de la tiutempa poezio.

La traduko de Waringhien sin adaptas kvazaŭ ganto al la verkoj de la francaj renesancaj poetoj, multfoje verso al verso, kelkfoje vorto al vorto. Kaj la sentoj de la poeto -amo, tenereco, nostalgio, ironio— respeguliĝas fidele, ĝis plej eta nuanco.

Kelkaj el tiuj versoj («Quand vous serez bien vieille...», «Comme on voit sur la branche...»), ĉirkaŭiris la mondon en studentaj antologioj, kaj estas nun vera ĝuo ilin retrovi en esperanto, kun ilia tuta brilo, koloro, movo kaj vivo. Kaj tiun veran mirindaĵon ni ŝuldas al la ama,delikata, profunda kaj konstanta laboro de s-ro Gaston Waringhien.

**JES**

# SCIU KE...

ESPERANTO-LIGO FILATELISTA KAJ AMIKA RONDO DE ESPERANTAĴKOLEKTANTOJ faka Organizo aliĝinta al U. E. A., kiu prezidas Ivar Paulsson, el Svedio, alvokas al la kolektantaj esperantistoj por propagandi Esperanton en ĉiuj direktoj per kolektado. Jam ekzistas diversaj katalogoj de poŝtmarkoj, poŝtstampoj, glumarkoj, insignoj eldonitaj en nia rondo, sed ni proponas al vi aliajn katalogojn. S-ro Gaston Trémon laboras en la katalogo «Jensen» kiu jam enhavas 12 paĝojn kaj 153 listigitajn glumarkojn, kaj preparas aliajn. Ankaŭ estas taŭga prepari katalogon pri presitaj esperantaj poŝtkartoj. Ĉiu interesito skribu rekte al S-ro Gaston Trémon, 31 rue Turgot. F 87350 PANAZOL (Francujo).

Jam funkcias la kampadejo por esperantistoj «Esperanto Oazo» en La Marxuquera - GANDIA (Valencio). Ĝi situas en mirinda loko proksima al la maro. Petu pli da informojn al S-ro Aquiles Sanz, Apartado 171 GANDIA, Valencia.

Vi povas esti membro de la INTERNACIA ESPERANTO KLUBO DE AMIKECO nur skribante vian familian kaj personan nomon kaj naskiĝdaton, krom la adreson. La membreco estas senpaga. Vi devas nur minimume skribi kvarfoje en la jaro al la klubo leterojn en kiuj vi povas skribi pri via lando, urbo, k. t. p. Vi ricevos bultenon.

Por esti membro de la I. E. Klubo de Amikeco skribu al Kastora Klubo Junulara Kulturdomo. Ul Deotymy 37; 01-441 WARSZAWA (Pollando).

Ĉiu infano, ĉirkaŭ 9 jaraĝa, povas trovi geonklojn esperantistajn. Tio helpas la junajn esperantistojn per kunligado koresponda kun plenaĝuloj, kaj tio estas la plej oportuna rimedo por praktika uzado de Esperanto pere de korespondado. La sistemo postulas ankaŭ liston de «geonkloj» el multaj landoj. Se vi deziras esti «onkl(in)o aŭ infano dezirante trovi geonklojn, skribu al la J. H. Sullivan, 3 Berwick Avenue. URMSTON, Manchester (Anglujo M 3 1, 1PS).

Eldonita de la norvega Reĝa Ministerio pri Ekstero aperis belegan turisman broŝuron, esperantlingve, «RIGARDO AL NORVEGUJO» verkita de E. Wellw-Strand kaj tradukita de C. Stöp-Bowitz. La broŝuron sendas senpage la Ministerio al ĉiuj norvegaj diplomatiaj instancoj eksterlande. Vi povas mendi tiun belan koloran broŝuron al Norvega Esperantista Ligo, Boks 942, OSLO 1 (Norvegujo) kiu tradukos kaj trassendos al la Ministerio por ekspedo.

La Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj kaj la Statuto de la Internacia Kortumo eldonis en Esperanto la Oficejo de U. N. por Informado, laŭ kontrakto kun U. E. A. kaj laŭ teksto aprobita de tiu asocio.

# Hispana Esperanto Junulara Sekcio

**Carreras Candi 34-36, Barcelono-28.**

Ĝoje ni publikigas sube, liston kun la unuaj 24 HEJS-gemembroj kaj 8 abonantoj al la revuetoj HEJS-Juneco kaj Koncize. Al ĉiuj sincerajn dankojn.

**HEJS-Estraro**

—Jordi Ferré i Martínez
—Salvador Guillermo i Viñeta
—Carlos Aragay i Girona
—Teresa Llaó Joval
—Santiago Llovera Colom
—Ana María Ranero
—Carlos N. Moya Seguí
—Francisco Miguel Muñoz Garre
—Teresa Gabarra Sala
—María Angela Serrano Ferigle
—María Carmen Hernández Alós
—Johano Deu Hernández
—Miguel Angel Sancho Pardo
—Antonio Gonzalez López
—Ricardo Felipe Albert Reyna
—Javier Rodríguez Vega
—José Miguel Remolina
—José Antonio del Barrio
—María Martina Madrazo Escolar
—Esteban García Simón
—Trinidad Sigüenza Ayuso
—Antonio Verdú Caselles
—Rosa Herrero Ramírez
—José María Rodríguez Hernández

**ABONANTOJ**

—Josep Climent i Grañana
—Frateco Esperanta Societo
—Juan José Millan Millan
—José Ramón López Tejerina
—Felipe Díaz Lacarta
—Salvador Aragay Galbany
—Miguel Gutiérrez Aduriz
—Johano Azcuenaga

Delegito en Madrido:

Miguel Angel Sancho Pardo
Marcelo Viera 163
Madrid-26
Teléfono 469 68 60

---

# CONVOCATORIA A JUNTA GENERAL DE LA FEDERACION

De conformidad con lo establecido en nuestros Estatutos, se convoca a Junta General Ordinaria, que se celebrará en Murcia, el día 21 de julio, a las 12 de la mañana, en la sede del XLI Congreso Español de Esperanto (Universidad de Murcia), con arreglo al siguiente

**ORDEN DEL DIA**

1º Lectura y aprobación, si procede, del Acta de la Junta General anterior.
2º Estado de Ingresos y Gastos de 1980.
3º Estado de Cuentas del Servicio de Libros.
4º Memoria de actividades desarrolladas del 1-7-1980 al 30-6-1981.
5º Propuesta de sede para el próximo Congreso.
6º Ruegos, preguntas y proposiciones.

EL SECRETARIO

---

# Premio «VIOLO» en la 19-a Internaciaj Floraj Ludoj

## PREĜO

En la fund' de mia kav'
per ne rompebla katen'
al kolono manligit'
estas mi.

En obskur'
kun okuloj tolkovrit'
estas mi.

Sub la skurĝo de la fat'
sub la batoj de la sort'
sub la mokoj kaj la rid'
estas mi.

Kie gloras Dia glor'?
Kie kaŝas sin la am'?
Kiu jetis min al plor'?
Kiu nudis min de pac'?

Min kompatu, mia Anĝel',
ne min lasu, mia Di',
filo via, via fil'
estas mi.

Ĉar meze de l' tumulto de la strat'
blindite de la lum' de l' vivofilm'
vortice de la kirloj de l' homar'
ĝissate de l' karesoj de virin'
solas
mi

**JES**